

Heinrich Heine,  
En nord' unu pino  
en solo

*tradukita de Ludwig Lazarus  
Zamenhof*

*Iomete ŝanĝita versio*

En nord' unu pino en solo  
Dormetas sur nuda altaĵ;  
Glacio kaj neĝa tavolo  
Ĝin kovras per tomba tolaĵ'.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia  
Ĝi estas en orient',  
Eterne pri lando alia  
Sopiras ĝi en silent'.

*Traduko de la Germana poemo  
"Ein Fichtenbaum steht einsam"  
de HEINRICH HEINE (\*1797-12-  
13 - †1856-02-17) en Esperan-  
ton de LUDWIG LAZARUS ZA-  
MENHOF (Ludoviko Lazaro Za-  
menhofo, \*1859-12-15 - †1917-  
04-14).*

*Arg-1023-2074 (2014-05-23  
14:39:50)*

*Mi, Manfred Retzlaff, aliĝis en  
2014-05-23 la Zamenhofan tra-  
dukon tiel, ke la rim-skemo estas  
la sama kiel en la germana ori-  
ginalo.*

Heinrich Heine,  
Pinarbo staras sola

*tradukita de Friedrich Pillath*

Pinarbo staras sola  
En nordo sur nuda altaĵ'.  
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio  
Ĝin kovras blanka litaĵ'.

Sonĝadas ĝi pri palmo  
Ĝemanta en orient',  
Soleca, sur arda deklivo  
En maldolĉega silent'.

*Traduko de la Germana poemo  
"Ein Fichtenbaum steht einsam"  
de HEINRICH HEINE (\*1797-12-  
13 - †1856-02-17) en Esperanton  
de FRIEDRICH PILLATH (†1932-  
04.03).*

*Arg-1023-2287 (2015-03-19  
16:43:44)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi,  
Manfred Retzlaff, trovis en  
[http://donh.best.vwh.  
net/Esperanto/Literaturo/  
Poezio/heine/pinarbo.html](http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html).*

Heinrich Heine,  
Ein Fichtenbaum  
steht einsam

Ein Fichtenbaum steht einsam  
Im Norden auf kahler Höh';  
Ihn schläfert; mit weißer Decke  
Umhüllen ihn Eis und Schnee.

Er träumt von einer Palme,  
Die fern im Morgenland  
Einsam und schweigend trauert  
Auf brennender Felsenwand.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo  
estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-  
13 - †1856-02-17).*

*Arg-1023-2072 (2014-05-23  
14:24:32)*

*La poemo troviĝas interalie en  
[http://www.heinrich-heine.  
net/haupt.htm](http://www.heinrich-heine.net/haupt.htm).*